

Annette von Droste-Hülshoff,

Al mia patrino

tradukita de Manfredo Ratislavo

Poemon belan emus fari mi
Pri via am' kaj fideleco via
Volonte vekus mi talenton ĉi
Por glori vin per io poezia.

Sed kiom ankaŭ pripensadis mi
Kaj kiom ankaŭ mi la rimojn metis,
De l' koro ondoj fluis super ĝi,
La artan konstruaĵon teren ĵetis.

Nun prenu tiun simplan donon ĉi,
Ĉi tiujn simplajn vortojn senornamajn.
Animon mian tutan donas mi
Kaj kune ĉiujn miajn sentojn amajn.

*Traduko de la Germana poemo "An meine Mutter" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1994-12.*

MR-263-3a / Arg-64-126 (2004-02-05 09:55:45)